54 (72) MAJO/JUNIO 1984 ISSN 0150-5823

# laŭte!

Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista
Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20 FF
Giri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:
**Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT**

**********************************************************

## VI DIRIS : UTOPIO ?

*Iuj intelektuloj asertas kun memfido, ke komuna homa lingvo estas utopio. Car - ili diras - ĉiu popolo havas apartan spiriton, kiu estas esprimata per ĝia propra nacia lingvo. Tial, inter homoj de diversaj nacioj kaj lingvoj, vera komuniko ne estas ebla. Laŭ ili, por ekzemplo la penso de orientaziano estas tute nepenetrebla al okcidentano, kaj reciproke : do kiel ili povus kompreni unu la alian ? Eĉ uzante samajn vortojn, ili nepre interpretas ilin diference.*

*Aŭdinte tiujn pezajn argumentojn, mi ekridas ; kaj mi relegas leterojn de ekstremorientaj korespondantoj, aŭ libron de Miyamoto masao, aŭ paĝon de la revuo "El Popola Cinio" ; mi rememoras fluajn interparoladojn kun esperantistoj el Cinio, Japanio, Indonezio. Uzante nian komunan interrilatilon, neniam mi spertis ian malfacilon en interkomprenado. Mi konstatas, ke la pensoj kaj sentoj estas same esprimataj, eĉ se iafoje estas uzataj bildoj kaj metaforoj malsamaj, sed senpere kompreneblaj. La ploroj de japana virino, kiu perdis sian filon en Pacifika milito aŭ sub la Hiroŝima bombo estas similaj al tiuj*

*de usona patrino, kies filo pereis en Pearl Harbour aŭ de germana patrino, kies infanoj estas buĉitaj en la bombardado de Dresdeno aŭ de Hamburgo. Sama feliĉa rideto floras sur la lipoj de junaj geamantoj en Pekino aŭ en Moskvo. Ĉe ĉiuj latitudoj kaj longitudoj la cerbo same funkcias en ĉiu homa kapo, kaj la koro same batas en ĉiu homa brusto. Ĉie la korpo kaj animo same reagas al suferoj kaj ĝojoj, kaj eltrovas samajn vortojn por esprimi siajn sentojn kaj pensojn.*
*Ni ne lasu nin forlogi de sofismaj teorioj. Al ili ni trankvile kontraŭmetu nian praktikan sperton.*
*Vi diras : utopio, neebleco ? Ni pruvas la movadon marŝante.*

***Valo.***

*****************************************************

## EL LA "LAŬTEJO"

**Alvoko al tiuj, kiuj ankoraŭ ne reabonis al "L!" por 1984 :**

Ni ne registris la reabonojn de pluraj dekoj da pasintjaraj legantoj. Ĉar dum pluraj monatoj plagis strikoj en iuj poŝtaj centroj en Francio, eble iuj legantoj ne ricevis unu aŭ plurajn el la jarfina/jarkomenca numeroj. Ni do sendas kiel lastan "admonilon" tiun ĉi numeron.
Se troviĝas ruĝa kruco en tiu ĉi kvadrato : ☐
tio signifas, ke ni ne ricevis vian reabonon.
Anticipan dankon !.....
Reabonante, bonvolu eventuale informi, se numero mankas en via kolekto. Ni laŭeble sendos ĝin al vi.

**Abonoj en nepagipovaj landoj :**
Ĉ. 20 personoj el nepagipovaj landoj povas legi "Laŭte!"n dank'al abonmono donacita de "Laŭtuloj" tiucele iom krompagintaj. Dankon pro tiu solidaro !
Ve, multaj aliaj legemuloj el tiuj landoj sopiras ricevi nian bultenon. Pliaj donacitaj abonoj estus do bonvenaj.
Legantoj el nepagipovaj landoj : Se vi havas rimedon por iel kompensi (per E-literaturaj libroj, E-diskoj, filateliaĵoj...), bonvolu ekrilati kun la "Laŭtejo" en Laroque-Timbaut por interkonsento.
Informu nin almenaŭ unu fojon pri ricevo aŭ nericevo de la bulteno.
Sed pli ol materiala kompenso, ege interesas la red. de "L!" kaj la tutan abonantaron viaj kontribuoj per artikoloj, anekdotoj, desegnoj, ktp. Eventuale uzu pseŭdonomon. Dankon!
Laŭte-admin.

Nia debato :

# laboro, sendungeco, rajto je pigro

**J.G. :**
Nia mondo naĝas en plena frenezeco.
En niaj t.n. "disvolvitaj landoj" la moto de ĉiuj regantoj (tiel maldekstruloj kiel dekstruloj) estas : "Ni devas esti konkurkapablaj, ni devas kreskigi la produktivecon!". Sed oni ĉiam renkontas iun ankoraŭ pli konkurkapablan: Usonon por Eŭropo, Japanion por Usono, landojn kie la laboristaro estas tre malmulte pagata (Koreio, Tajlando...) por Japanio... la freneza vetkurado plu daŭras! Sed kio estas produktita (kun multe da senutilaĵoj!), tio devas esti disvendata. Al kiu ?

Por produkti konkurkapable oni devas maldungi laboristojn (en aŭtomobilaj fabrikoj, teksejoj, ktp), kies aĉetpovo malaltiĝas : la senlaboruloj povas malpli elspezi ol la aktivaj laboristoj. En la Tria Mondo la homoj malhavas la pluvivajn rimedojn, sed ankaŭ monon por aĉeti. Ili jam multe ŝuldas al landoj kiel Usono, Francio. Tio estas "la ekstera ŝuldo", kiel oni diras...

Proksimume sama situacio okazis dum la jaroj 1930-1935. La trovita solvo estis fabriki armilojn, dungi la senlaborulojn en la armeoj kaj poste elklikigi militon. Oni detruis multe da ekssenlaboruloj, urboj, vojoj, fabrikoj, sed poste oni rekonstruis (la fama "Marshall-plano"). Tiam okazis la industria ekflugo sed post nur proksimume dudek jaroj oni gurdis la saman problemon. La pli kaj pli modernaj maŝinoj anstataŭas la homojn dum la labordaŭro restas la sama (en Francio 40 horoj semajne en 1936, 39 horoj en 1984!). La konkurado interlanda rekomenciĝis. Oni provas trovi solvon, disvendante armilojn, kiujn oni uzas en lokaj militoj (vidu : Malvinaj Insuloj, kaj nun Libano, Ĉadio, ktp...), sed tio ne sufiĉas. La nombro da senlaboruloj kreskas

ĉiam pro "modernigo de la industrio" en la disvolvitaj landoj, pro "manko de rimedoj" en la Tria Mondo, dum en tiuj regionoj la industriaj kulturoj (arakido, kotono...) anstataŭas la proviantajn kulturojn. En Sud-Ameriko oni pli kaj pli kulturas toksaĵojn (kokaino...) por havi dolarojn kaj aĉeti porvivajn varojn eksterlande. Kiu solvo al tiuj problemoj? Kiel diris en sia libro la franca agronomo R. Dumont : **Ĉu utopio? ĉu morto?** Ĉu dispartigi la necesan laboron (kelkajn horojn tage aŭ semajne; la aliajn oni povus pigri!) kaj organizi mondskale la ekonomion? Sendube ekzistas multaj baroj ĉe profituloj, sed ankaŭ ĉe laboristoj! Tamen, jam en Usono kaj Federacia Germanio oni eksperimentas aliajn formojn de laboro : du personoj kune por la sama posteno, laboro grupigita en nur kvar tagoj semajne (dum la aliaj oni povus pigri!) kaj aliaj formuloj, kiujn oni povas imagi.
Ĉu la nuna situacio (kreskado de senlaboreco, malsato en la Tria Mondo...) ne trovos solvon kaj fatale kondukos al lukto por pluvivo kaj milito? Sed ĉiufoje la armiloj kapablos eksplodigi la planedon!

***Ĝiz el Lamark :***
*Iam estis LONGA tempo, kiam la senlaboreco estis privilegio de la superregantaj klasoj dum la laboro estis la mizera, malfeliĉega sorto de la brutoj, sklavoj kaj servutuloj.*
*Iam eble estos tempo, kiam la laboro estos privilegio de malmultaj superpagataj "specialistoj" kapablaj kontroli la konstruadon kaj funkciadon de la maŝinoj, aŭtomatoj kaj robotoj ĉiuspecaj.*
*Ĉu tiam la ceteraj homoj ankoraŭ deziros labori, aŭ preferos senĝene ĝui sian libertempon kaj la ordinaran renton destinitan al ĉiu civitano ekde ties naskiĝo? Revoj, revoj... mi legis tro da sciencofikciaj romanoj pri tiu temo. Ŝajnas tamen, ke la plimulto el la sciencofikciaj verkistoj konsentas kun la proverbo* ***"Senlaboreco estas la patrino de ĉiuj malvirtoj"*** *kaj pentras per malhelaj koloroj la senlaboran estontecon de l' homaro. Ekzemple, en la mal-utopia romano de Walter Tevis "Mokbirdo" (Mockingbird) la altlernejoj instruas al la gejunuloj : Memecon, Privatecon, Ĝuon kaj Plezuron. La aliaj sciencoj estas instruataj al la robotoj - se temas pri utilaj konoj - aŭ estas preskaŭ plene forgesitaj, se estas neutilaj aŭ malutilaj : inter la aliaj, malaperis la "arto" legi, ĉar ĝi povas plenigi la menson per ideoj, kio estas danĝera por la simpla korfeliĉo de la ordinara homo. Ĉar tia eduko kompreneble pli kaj pli stultigas la homojn, la gravajn taskojn devas plenumi pli kaj pli perfektaj homsimilaj robotoj.*
*Kiu dezirus vivi en tia mondo??*

*Pardonu, ke mi eĉ ne provis pritrakti serioze la temon; sed mia nesciado pri ekonomiko estas abisme profunda, kaj krom tio mi ne bone povas distingi inter laboro kaj ... mallaboro.*
*Por mi, skribi artikolon estas ŝatokupo; sed por ĵurnalisto la sama afero estas laboro : ĉu ekzistas ŝatokupo, kiu ne povas esti laboro por alia persono?*
*Kaj ĉu penado senpaga estas aŭ ne estas "laboro"? (se la respondo estas jesa, oni eble devus malpermesi ĉiujn nepagatajn laborojn, kiel ekzemple la hejmprizorgajn : tuj ekaperos multaj novaj laborpostenoj).*
*Ant' ol komenci skribi ĉi tiun artikoleton, mi relegis la amuzan eseon de Bertrand Russell* ***"Laŭde al la pigro"*** *(In praise of Idleness). Multajn spritaĵojn mi trovis, sed pri konkretaj ideoj..hm... En 1935, Russell revis, ke la socialismo povos realigi la idealon laborigi ĉiun homon nur kvar horojn tage, kaj doni bonan edukon por permesi al ĉiu ĝui sian libertempon home, ne brute.*
*Verŝajne ankaŭ Russell legis tro da fikciaĵoj, ĉu ne?*

**Nicole D. :**
Same kiel Ĝiz, mi havas demandojn : Kio estas "laboro", kio estas pigri ? Kvankam malfacila pro manko de ekonomiaj scioj por serioze argumenti, tiu vasta temo meritas iom da atento.
Laboro : malestiminda (ĝis) kiel maldigno?
Laboro = puno, premanta, stultiganta?
(Ĉu vi scias, ke etimologie "laboro" signifas rimedon por torturi!...) aŭ laboro glorata kiel "Solvo" al la homaj malfacilaĵoj, al la malvirtoj? Ne taŭgas al mi tiuj nuraj asertoj. Ĉar ĉu laboro estas nur salajrata okupo? ĉu nur market-produktado? aŭ ĉu ankaŭ neceso por "vivi", por evolui?... Kial labori? ĉu nur por vivteni? ĉu por riĉiĝi nur materie? aŭ ankaŭ por iĝi sufiĉe sendependa? eĉ libera?...

Pri salajrata laboro : Estis (estas) ribeloj, revolucioj, luktoj kontraŭ tiuj, kiuj sklave laborigas la aliajn,

por plibonigi la vivkondiĉojn (materiajn kaj kulturajn) de la laboristoj. Ne facile estis akiri minimuman socialan protekton kaj ĉiam tiuj rajtoj estas ege malfirmaj. Kio estas salajrata laboro en hierarkia socio? Plej ofte kunfrontadoj inter fortoj nesamcelaj... Nun pli kaj pli, same kiel okazas en sciencofikciaj verkoj, laboro estas ege specialigita, dividita kaj postulas fakulojn, klerajn teknikistojn pli kaj pli potencajn kaj nur "manlaboristojn", kiuj agas kiel mekanikaĵoj, kiujn oni pli kaj pli anstataŭigas per robotoj. Kaj, se robotoj eĉ teknike mirindaj, estas tamen nur maŝinoj, tiuj, kiuj kreas, kontrolas ilin, estas ege potencaj; eblas al ili paralizi la socion...
En la pasinteco okazis teruraj malabundecoj, multaj homoj mizere mortis, ankaŭ nun mortas milionoj da personoj, da infanoj, pro malsato kaj pro mizerego - sen kalkuli kun la militoj, kiuj buĉ-oferas multe da vivoj... Tiel, ĉu eblas esperi, ke potenculoj nutru, flegu, eduku senlaborulojn (se ĉi-lastaj mem elektus tiun situacion), kiam ili ne plu estos utilaj laŭ ekonomia vidpunkto, kiel konsumantoj aŭ/kaj produktantoj? Ŝajnas al mi, ke solidareco, donacemo ankoraŭ ne apartenas al la kutimaj virtoj de la homaro...
Sed per salajrata laboro eblas emancipiĝi - tion spertis virinoj, gejunuloj -... kondiĉe, ke oni ne "sklave" laboru! - Malfeliĉuloj oni iĝas, kiam oni havas pezajn ŝuldojn, kiam ne plu eblas (aŭ kiam malfacile eblas) fari tion, kion oni ŝatas, resti kun ŝatataj personoj, malstreĉe vivi, ripozi... Kiam sen salajrata laboro oni ne plu kapablas vivteni, kiam laboro profesia koruptas eĉ la plej naturajn taskojn kiel varti infanojn, purigi sian viv-medion, helpi aliulon... kiam la laboro ne plu havas "radikojn" en la tuta aktiveco de la homo, kiam ĝi iĝas tute artefarita, mekanika, aparta de la personeco...

Laboro nesalajrata : ekzemple laŭ la fizika senco: Produkto, efiko de fortoj, de energioj ĉu mekanikaj, ĉu mensaj...
Streboj, ekzercoj por trafi lertecon, por sin instrui, por sin "konstrui", por pli bone ĝui, konscii vivon... Sen iu ajn klopodo ĉu eblas vivi? (ĉu estas ekzempla kaj enviinda la almozulo? la eterna asistato?)

Pri sendungeco : Ĉu temas pri trudita forigo el la



laborista mondo? aŭ neebleco eniri tiun mondon? aŭ ankaŭ rifuzo submetiĝi al ia ajn laboro? Ĉu ankaŭ angoro, timego de la laboristoj? malsano endemia de la modernaj ekonomioj? Ĉu konsekvenco de kreskanta popolizado?... Tre grava, laŭ mia opinio, estas la malfacilaĵo al la nuna junularo eniri la laboristan mondon, ĉu ne estas signo de civilizacia krizo, eĉ de socia dekadenco? Ĉar, kian estontecon al socio, kiu ne havas lokon por la gejunuloj? (jam estis grava faro flankenmeti virinojn, malsanulojn, maljunulojn!)...

Pri pigro. Kion signifas rajto je pigro?
Ĉu nur rezigni pri profesia laboro? aŭ rezigni pri materiaj avantaĝoj? Ĉu atendi, ke la aliaj provizu niajn bezonojn sen ion fari, nur pasive ĝui aŭ enui? neniam trudi al si taskon? Tiel "laborevitulo" bone taŭgus kiel difino... Sed kiu ne jam spertis kiom agrable estas vivi kun sana persono, kiu ĉiam pigris? ĉu daŭre eltenebla?...
Respondojn eblas trovi al tiuj demandoj :
En la socioj laŭdire primitivaj kiel la indoneziaj, la indianaj el Ameriko, antaŭ la koloniado, en la nuntempaj alternativaj komunumoj... La idealo estus por mi, ke ĉiu homo rajtu vivteni sin sen submetiĝi, ke li kapablu sin organizi por rifuzi sian salajratan laboron okaze de alfrontoj, ke li konsciu pri la necesa interhoma solidareco, ke ĉiu rajtu laŭdezire labori duon- aŭ triontempe, lerni kaj fari alian metion, ke eblu al ĉiu pliprofundigi sian kulturon, ke "artoj" eniru en la ĉiutagan vivon, ke ĉiu zorgu pri sia sano, korpa kaj mensa, ke ĉiu respektu sin mem kaj la tutan naturon, vivu ekologie... sed... ankaŭ mi plonĝas en utopion aŭ en naivecon!

***Jean-Claude :***
*Laboro, sendungeco kaj pigro estas morale strikte interligitaj. El nia sinteno al la unua dependas ekzisto de la du aliaj kaj kiel ni travivos ilin.*
*La laboro estas natura fakto. Gis antaŭ nelonge oni vidis ĝin kiel universalan senkompatan konkuradon. Pli atenta observado sciigas al ni, ke estas pli da reciproka helpo, ol ni kredis : tion diras la scienco. Ve! la homaro plu surdas al tiu instruo kaj plu laboras nur cele al profito. Krome, klasifiko laŭ "noblaj" kaj "malnoblaj" profesioj (kun ĝiaj salajraj kaj psikologiaj konsekvencoj) plidensigis la ĝangalon.*

*En tiaj kondiĉoj la laboro perdis sian naturan destinon de socia servo. Ni vidas la rezulton : sendungeco estas katastrofo, morala kaj mona.*
*Kaj ne mirige, ke, laborante en etoso sentata senjusta, stresiga, ĉiu emu al pigro, eĉ ĝin rigardu kiel rajton.*
*La solvojn elpensas "saĝuloj". Sed ili kolizias kun ĝeneralaj egoismo, nescio.*
*Resume, necesas nova pensmaniero. Tio eblas por ĉiu, ĉe ties nivelo. Tiu postulo denove venigas nin al edukado kaj kulturo - pri kiu jam estis insistite - por ke ĉiu povu sin senti utila al ĉiuj.*
*Sed esti utila, kio estas? El kio tio konsistas?*

********************

## Nia dokumento /
## Ĉu utopio aŭ ĥaoso ?

Por aboli la militon, la militminacon kaj ĉiuspecajn armilarojn, endas, ke ĉio troviĝanta sur kaj en la Tero fariĝu komuna heredaĵo de la tuta homaro. Tiam la produktado okazos por la nura kontentigo de la homaj bezonoj, sed ne plu por la vendado kaj la profito, kaj tiam ekaplikiĝos la principo "ĉiu laŭ siaj kapabloj, al ĉiu laŭ ties bezonoj". Alivorte, oni ne plu mezuros la kontribuon alportitan de ĉiu individuo al la produktado (kio cetere jam nuntempe ne eblas, tial ke la produktada laboro estas jam socialigita, t.e. kolektiva procezo), sed ĉiu plejeble kontribuos, kiel ŝi/li povos aŭ volos, kaj povos libere disponi pri ĉio necesa por vivi, neniel pagante. Tiu ideo ne estis elpensaĵo nia, sed male revo tiel malnova kiel la homaro mem, ekde kiam malaperis la "primitiva komunismo".

La abolo de mono, nemerkata socio, jen kio estas komunismo, aŭ socialismo, se oni volas, ne gravas la nomo, kvankam tiuj terminoj estis tiom fuŝuzitaj, ke foje oni emus ilin forlasi.
Senmona socio (ne nur sen mono, kompreneble, sen ankaŭ sen varoj, sen salajroj, sen profitoj, sen bankoj) estas logikaĵo, tial ke oni jam havas produktadon kolektivan kaj kapablan liveri abundecon por ĉiuj. Tia socio estus vere homa socio, en kiu la rilatoj stariĝus inter homoj, kaj ne inter vendistoj kaj aĉetantoj, dungistoj kaj salajruloj, registoj kaj regatoj, gvidistoj kaj gvidatoj.

Tian socion oni foje taksas utopio. Sed kial timi tiun terminon? Estas neniu solvo al la hodiaŭaj sociaj problemoj en la kadro de kapitalismo kaj endas do imagi diferencan socion, vere anstataŭan solvon. Nedubeble, la alternativo estas : utopio aŭ ĥaoso.

Estas vere, ke longtempe la socialismo estis nur bona ideo, ideala socio priskribita de verkistoj kiel Tomaso MORE, sen rilato kun la tiuepoka socia realeco. Tamen, de post la industria revolucio, la socialismo fariĝis reala eblaĵo, kaj tial, ĉar la reala bazo de socialismo estas industrio kapabla liveri sufiĉe da varoj kaj servoj kaj elimini la malriĉecon kaj mizeron ĉie en la mondo. Tiun punkton oni atingis komence de nia jarcento kun la tutmondiĝo de la produktado (kio tradukiĝis, sub kapitalismo, per imperiismo) kaj kun la elektrizado de la industrio. La tuta sekvanta progreso teknologia nur pli kaj pli ebligis la starigon de socialismo sur la materiala kampo.

Sed socialismo estas vere ne nur afero pri teknologio. Teknologio estas ĝia bazo, sed socialismo dependas ankaŭ de la homa volo kaj ankaŭ sur tiu kampo la kapitalismo kreis kondiĉojn favorajn al la starigo de socialismo, kreante tutan klason el homoj, kies intereso estas rearanĝi la socion en socialisman socion. Tiu klaso estas la salajrularo, la laborantaro, ĉiuj, kiuj hodiaŭ estas devigataj vendi sian laborforton por vivi, t.e. pli ol 90 % el la loĝantaro de la industriiĝintaj landoj. Iuj uzas la vortojn "laborista klaso", sed tiuj vortoj povas konfuzigi, ĉar "laboristo" pensigas pri "manlaboristo", dum la manlaboristoj estas nur unu parto el la salajrata klaso. La socialismo, komunismo, estas la intereso de ĉiu salajrulo, oficisto,, instruisto, funkciulo, ktp... Tial ni preferas la vortojn "salajrularo" aŭ "laboranta klaso", kiuj perfekte klarigas la sencon de la socialisma mesaĝo : ĝi celas la grandan plimulton el la popolanaro kaj liveras al ĝi la nuran solvon al la diversaj problemoj, kiujn ĝi devas nun alfronti.

Sed tiun solvon la plimulto mem devas malkovri, kompreni, voli. Malnova principo asertas : "La emancipado de la laboristaro estos la faro de la laboristaro mem", kaj fakte la starigo de socialismo povos esti nur la konscia verko de konscia plimulto. Tio estas logika, pro la naturo mem de la socialisma socio, kiu estos sen altrudo, sen ŝtato, kaj do bazita sur memvola kunlaborado. Por starigi kaj funkciigi ĝin, endos do voli ĝin kaj kompreni ĉiujn ĝiajn implicojn. Jen do la dua antaŭkondiĉo : socialista plimulto, kiu volas socialismon kaj komprenas ĉiujn ĝiajn implicojn.

El tiuj du kondiĉoj, sufiĉe disvolvita produktada sistemo kaj socialista plimulto, jam de longe estas realigita la unua, dum la dua tute ne. Estas fakto, ke hodiaŭ la plimulto ne volas socialismon, sed male akceptas kapitalismon (inkluzive de ĝia ŝtatkapitalisma formo rusia, ĉinia, ktp...). Kiel do atingi, ke plimulto deziru socialismon kaj tiel faru ĝin tuj atingebla ?
Estontece, preskaŭ certas, ke tiu ekkonsciiĝo okazos, ĉar la geviroj estante raciaj estaĵoj pli-malpli frue ekkonscios, ke la nuna sistemo

ne funkcias por ilia intereso kaj ke socialismo estas la nura solvo al la hodiaŭaj sociaj problemoj. Sed "estontece" estas tre malpreciza vorto kaj eĉ se ni estas profunde konvinkitaj, ke en pli-malpli malproksima estonteco la homaro vivos en socialisma socio, ni tamen devas demandi al ni kion ni povas hodiaŭ fari por akceli la procezon. Ne multon, vi diros, kaj tio estas vera. Sed oni povas almenaŭ ne prokrasti ĝin, se oni ne lasas sin gluti per tiu aŭ tiu ĉi kapitalisma reformo, per tiu aŭ tiu ĉi politika kverelo, sed male, se oni dediĉas sin al ununura aktivado : la disvastigado de la socialisma ideo. (Same, ankaŭ la sindikata aktivado restas utila, ne por konduki al ŝanĝo, sed simple por rezisti kontraŭ la premoj de l' kapitalo kaj defendi la vivnivelon de l' salajrularo). Dissemante la socialisman ideon, ni helpas al la ekkonsciiĝo, kiu pli-malpli frue okazos, kaj por tion fari ni organiziĝas en etaj organizoj nomitaj "partio", "grupo", "ligo", "asocio", ktp... laŭ la landoj.

Frontartikolo de "Socialisme Mondial 24"
(n-ro 2 de nov. 83). Adreso : BP 26, B 6700 ARLON
Elfrancigis Kribo.

(La tezo de tiu socialisma grupo estis esperantigita kaj eldonita de SAT-Broŝurservo antaŭ kelkaj jaroj (nun elĉerpita teksto).

*******************************************************************

**Ekologio :** Kun ĝojo niaj regantaj teknokratoj anoncas al ni por 1984, la naskiĝon de sia lasta ido : SUPERPHENIX, belega bebo de 1300 MW. La tre okupataj feinoj ĉirkaŭantaj la lulilon iam aŭguras al ĝi multnombran posteularon. Al tiu misaŭgura naskiĝanonco, jen la respondo de la Ĝeneva Alvoko-Asocio* : La Geneva Alvoko Asocio atentigas, ke malgraŭ la ĝenerala indiferenteco forte kuraĝigata de la amaskomunikiloj, la francaj opoziciantoj al Superphénix ne rezignis. Tial la opoziciaj asocioj kontraŭ Superphénix daŭrigas sian konsciigan kampanjon :

- la 5an/6an de majo en Liono : nacia kunordigo.
- la 10an de majo : lanĉado de gazeto, gazet-prelegoj. GRAVA TAGO.
- la 26an/27an de majo en Creys-Malville : internacia kunveno ĵus antaŭ la Eŭropaj voĉdonadoj.
- la 4an/5an de aŭgusto : internacia amasrenkontiĝo en Creys-Malville.


Eblas ricevi la petician tekston : "Ni haltigu Malville kaj la superregeneratoran 'filion' " ; la ĉiumonatan bultenon ; la gazeton... skribante al Coordination nationale pour l'arrêt de Malville c/o CEP B.P. 5006 St Jean, F 69245 LYON CEDEX
aŭ al : Ĝeneva Alvoko Asocio, Case postale 89, CH 1212 Grand Lancy 1

---------

* La Ĝeneva Alvoko Asocio arigas oponantojn al atomcentraloj, ĉefe supergeneratoroj. Iniciatis ĝin eminentaj sciencistoj.

Ginette G.





# ĉies voĉo pri ĉio ajn

## Leo POLAK kaj la bojado

*En Laŭte n-ro 53 iu Jakelino reagas al la du broŝuroj de Leo POLAK, Unueco super prokreda dividiĝo kaj Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo. Ili aperis ĉe SAT-broŝurservo. Fakte ŝi nur iom okupiĝas pri la unua broŝuro, ne observante plej elementajn regulojn. Kvankam mi kutime ne respondas al anonimaj personoj, mi ĉi-kaze faru escepton, por ĝustigi eblan falsan impreson ĉe la legantaro.*

*J. eĉ ne kelkvorte informas al siaj legantoj kiu estis Leo Polak. En sia skribaĵo ŝi senklarige mencias la jarnombron 1931, kio ja povas kaŭzi embarason ĉe la legantoj. Nu, temas pri radioparolado farita de Leo Polak en 1931. Polak estis profesoro pri filozofio en la universitato en Groningen, Nederlando, kaj pereis en decembro 1941 en la koncentrejo Sachsenhausen. Mi tradukis la du broŝurojn el la nederlanda.*

*Jam tuj en la komenco Jakelino aminde diras : "Ni pensas same, sed esprimas nian penson per malsamaj mitologioj. Tion, kion Leo Polak nomas "racio" mi nomas "sankta spirito". Sed temas nur pri vorta diferenco La mitologio de Leo Polak ne estas pli racia ol la mia."*

*Mi tre bone konas ĉi tiun rezonmetodon. Jakelino NE pensas same kiel Leo Polak, male, ŝi stumble kaj spasme klopodas obskurigi liajn ideojn. Polak bazas sian etikon sur la Racio, kio trasonoras tutan lian argumentadon. Mitologio konsistigas la menson de Jakelino, sed tio ne rajtigas ŝin, simple aneksi Leo Polak. El vidpunkto de higiena pensado ŝia identigo de racio kun "sankta spirito" (kion ajn ŝi komprenas*

*sub tio) estas kompleta mikspoto, filozofie neakceptebla.*

*J. plufuŝas, dirante : "Ekzemple, li supozas ke, se ĉiuj irlandanoj estus ateistoj anstataŭ kristanoj, ili amus unu la alian kaj vivus pace." Polak diris : "Ĉe la limo de la protestanta Ulstero en Irlando kaj la romkatolikaj distriktoj, protestantoj kaj romkatolikoj estas senpardonaj malamikoj. Same amare kiel prave unu el tiuj limloĝantoj diris : "Se ni estus ateistoj, ni vivus unu kun la alia en paco kaj amikeco; sed nun kiam ni estas kristanoj, ni vivas kiel kato kun hundo." Polak do* citis *limloĝanton, en specifa cirkonstanco.*

*Li, Polak, kutime ne nomis sin ateisto, probable pro la negativa signifo de tiu nocio. Li preferis la indikon liberpensulo. La vorton ateismo oni vane serĉos en la du broŝuroj.*

*Kial Jakelino ne citis jenajn vortojn de Polak, por almenaŭ doni iom da objektiveco al sia skribaĵo : "Nura nekredo ankoraŭ ne estas libera pensado; nura negativa "sendieco" ankoraŭ ne estas pozitiva racieco aŭ moraleco, se ne paroli pri toleremo, tiu same rara kiel rava frukto de la arbo de l' Objektiveco." Ĉi tiuj vortoj tute superfluigas la rimarkojn de J. pri la "ateismaj ŝtatoj", ktp. Tie ja estas parolo pri totalismo kaj "ruĝa jezuitismo", kies inkvizicio mense kaj fizike eliminas ĉiun individuon ne dirantan amen.*

*J. asertas ke Leo Polak havas teruran bildon pri kristanismo. Mi atentigu ke lia tuta parolado estas pasia pledado por libera pensado kontraŭ dogmismo kaj subpremo far religioj. Kristanismo kun ĉiuj siaj sektoj estas nur unu el tiuj religioj.*

*Plua konigo de J. : "Leo Polak supozas, ke teologoj ne kredas la dogmojn, kiujn ili inventas..." (-). Leo Polak argumentis : " (-) ni scias kun la sama certo ke ĉiuj kredodogmoj kaj kredo-artikoloj kiuj enhavas absurdaĵojn (tri-unuon, transsubstanciigon, enkarniĝon de spirito ktp), estas elpensaĵoj de teologoj kontraŭaj al la vero. Ilin la buŝo ja povas konfesi, sed la pensado ne povas akcepti." Ĉu Jakelino serioze pensas ke teologoj konsekvence kredas siajn dogmojn? Nu, tio havus tre strangajn konsekvencojn por ili en la ĉiutaga vivo.*



*Jen kelkaj citaĵoj de Leo Polak, por fari iom da justo al lia pensado :*

*" (-) Kaj la tero iĝas ruĝa pro la sango de la sanktaj militoj por la sankta kredo de parsioj kaj lamaoj, judoj kaj paganoj, protestantoj kaj katolikoj, mahometanoj kaj hinduoj. Tiele la* sektoj *kaj la* sektanoj *tranĉas kaj noĉas en korpon kaj animon de la kompatinda homaro..."*
*"Tiel la religio estas la granda disfendanto de la kulturo, kiu incitas popolon kontraŭ popolo, genton kontraŭ gento, vilaĝon kontraŭ vilaĝo, familion kontraŭ familio, edzon kontraŭ edzino kaj fraton kontraŭ frato en la plej akra, la plej principa, la plej fanatika malamikeco, nome : la proreligia malamo, la kredomalamo."*
*"Eĉ se ĉiopova diablo regus la mondon, kiu damnus nin pro niaj virtoj kaj beatigus nin pro niaj pekoj, karaktero restus karaktero, justo restus justo, trompo restus malestiminda kaj honesteco devo. Tiom absolute moraleco sendependas de kredo."*
*"Kaj kiel la logiko estas afero de la* prudento, *sendependa de kredo aŭ nekredo, tiel same honesto, amo, justo estas aferoj de la* koro, *de* karaktero, *de* inklinado, *sendependaj de kredo aŭ nekredo."*
*"Nu, ĉia malbono, ĉia miseco de volo aŭ inklineco baziĝas sur ĉi tiu falsanta mi-perspektivo, la volata partieca, subjektiva prefero por ni mem super aliaj homoj. Tio estas la reala, morale kondamninda egoismo, radiko kaj esenco de ĉia malbono."*
*"Kaj la t.n. ora fundamenta regulo de ĉia moralo, denove egala ĉe judo kaj kristano, ĉino kaj budhisto: "Kion vi ne volas ke oni faru al vi, ankaŭ ne faru al aliaj (-) do estas nur alia formulado aŭ konsekvenco de tiu sama norma bazo, de tiu sama inklineca idealo de la* objektiveco. *(-) Kiu volas objektive, tiu faru kion li volas."*

*Nun mi ĉesu, ĉar mi ja devas konstante citi Polak por korekti Jakelinon. Mi intencis diri kelkajn vortojn ankaŭ pri religioj en Nederlando ("La plej malobea katolika provinco"), sed Jakelino ne meritas ke mi faru ankaŭ tiun penon. La kernon de la argumentado de Leo Polak, nome la aŭtonomian moralon, t.e. la propranorman moralon kontraŭ la heteronomia, t.e. la ordona moralo, ŝi tute ne tuŝis. Mi cetere havas la impreson ke ŝi neniam aŭdis pri ĉi tiu filozofia*

*problemo, kiu iras tra la homa historio kiel daŭra motivo.*

*Fine, mia plej granda obĵeto direktiĝas kontraŭ la fakto ke Jakelino misinforme atakas vidpunktojn de pensulo sen ke la plimulto de la legantoj de Laŭte scias kion li reale diris. Tio estas grava malsano en ĵurnalismo kaj diskutado ĝenerale. Oni ĉiam adekvate klarigu la vidpunktojn de sia oponanto en polemiko ktp., se legantoj aŭ aŭskultantoj ne konas tiujn vidpunktojn. Laŭ ĉi tiu kriterio la skribaĵo de Jakelino estas treege sub la nivelo de deco. Leo Polak vere meritas pli objektivan, pli kapablan recenziston.*

*Dume mi konsilas al la geamikoj pripense legi la du broŝurojn. Tio kompreneble validas ankaŭ pri la aliaj eldonoj de SAT-broŝurservo, inter kiuj estas veraj juveloj!*

*07.04.84 Feiko Munniksma (Nederlando)*

****************

## Pri la cirkla kvadraturo

*Mi deziras aldoni kelkajn interesaĵojn pri **Pi** (kiujn mi trovis en la iluziista ĉapelo malgraŭ la fumnubo!). Popola proverbo ne estas la oficiala Vero! De kelkaj jarcentoj ĉiuj geknaboj lernas solvi la cirklan kvadraturon per la nombro **Pi**. Por kiu forgesis ĝin jen formuloj:*

*PI = 4 * ATN (1)*
*aŭ: PI = 80143857 / 25510582*
*aŭ por komputilistoj :*

```
 5 REM "KALKULO" DE PI
 10 DATA POR, L, ARTA, L, AMUZA, KVADRATUR,
 EL, NOMBRO, TAWGA, NUN, LERNU
 20 DEFDBL  P,A
 30 N = . 1
 40  FOR I = 1  TO 11
 50  READ A$
 60  A = LEN (A$)
 70  N = N * 10
 80  P = P + A/N
 90  NEXT
 100  PRINT "PI=" ; P
```

*(La W anstataŭas la U malfacile tajpeblan kaj erarigan).*

*PMG*

(La red. konfesas, ke li komprenas nenion. Kaj vi?)



## Ruĝa Placo kaj Blanka Domo

*Mi tute konsentas kun la propono de Paŭlo, ke pacistoj, aŭ silentu, aŭ kritiku ambaŭflanke. En Usono, la pacistoj ne silentas, sed manifestacias antaŭ la Blanka Domo por esprimi siajn kritikojn kontraŭ Pershing. Ĝuste tial mi proponis, ke, por respekti la ambaŭflankecon, ili petu vizojn por manifestacii sur la Ruĝa Placo por tie esprimi siajn kritikojn kontraŭ SS20.*

*Jakelino.*

## Kiamaniere... "de fadeno al pinglo"...?

*(daŭrigo de "Oni neniam antaŭe scias"; vd. n-ron 53)*

*De vorto al vorto, matene je la 11a, ŝi demandis kion oni faru por geedziĝi, se oni renkontas viron laŭ sia gusto.*
*Mi respondis, ke oni iras al la urbestro por demandi kion fari... mi tion ne scias.*
*La saman tagon tri horojn posttagmeze, ŝi alvenis kun presitaj paperoj kaj ridante... plenigis unu el ili, enskribante siajn nomon, aĝon, adreson, ktp... Kaj ĉiam ridante ŝi petis, ke mi por ŝerco... plenigu la alian. Semajnon poste mi aŭdis ŝin demandi al mi kun rido : "Kion oni faru poste...?"*
*Mi respondis, ke mi opinias, ke oni aĉetu du edziĝringojn. Unu horon poste, ŝi montris al mi belegajn edziĝringojn en sia mano kaj invitis min... provi alian ringon.*
*Sen pensi pli mi ĝin provis, ĝi estis laŭ mia mezuro. Ŝi tiam diris jam serioze : "Se ni geedziĝus, ĉu vi ne ŝatus, en komuna vivo, pagi nur la duonon de via lupago, la duonon de la hejtado, matene ne plu fari vian kafon, ne plu daŭrigi vian hundan vivon, manĝi tagmeze laŭ via gusto, dum la tago havi iun por paroladi... kaj iun por kvereli... vespere viziti kinejon... kaj nokte...*
*Mi komprenis, ke ŝi pravas. Finita la hunda vivo. Mi diris "Jes"...*
*Pri la sekvo mi bedaŭras nenion...*

*-nn-*

## Mi aŭskultis radiodissendon...

*La deknaŭan de marto '84a, mi aŭskultis radio-dissendon, kiu ege konsternis min, kvankam mi jam detale konis la fakton : temas pri la perforta elpelo, en la pariza kvartalo "La Goutte d'Or", de la loĝantoj, fare de C.R.S.-anoj helpataj de dresitaj hundoj!*

*Ĉu mense sanaj homoj, eĉ se temas pri profesia "laboro", povas plenumi tiajn agadaĉojn?!! Plie, kontraŭ homoj, kiuj lupagis sian loĝejon kaj neniel endanĝerigas la "sociordon"? Do, la 7an de februaro (tiaj elpeloj estas leĝe malpermesataj dum vintro) frumatene, je la sesa, la tieaj loĝantoj havis nur dek minutojn por eliri el la loĝejo, kunportinte nur tion necesan por la tago, eĉ koncerne la bebojn (la saman tagon, vespere, ili estu loĝigotaj). La 19an de marto fakte ili estas ankoraŭ amasigitaj en senfenestra ĉambrego. Ili estas apartigitaj: viroj, virinoj, kaj infanoj meze de la ĉambrego. Estas neeble dormi en tiu loko, pro la diversaj horoj de eniro aŭ eliro de la homoj ; iuj, eble ĉiuj, laboras. Dektri-jara knabo ege malgajas, li tute ne komprenas tian agmanieron kontraŭ ili, enmigrintoj. Oni petis ilin starigi liston de siaj propraĵoj, celante rehavigi ilin al ili. Ofte okazis, ke ili ricevis ne ĉion aŭ ne proprajn aferojn, inter kiuj estis ekzemple akvovarmigilo, t.e. sufiĉe gravaj aĵoj. Unu listo falis sur la straton, kie la pluvo difektis ĝin. Tiam oni ne refaris la liston.*

*Oni faris al ili "humanajn" proponojn :*

*1) apartigi la infanojn disde la gepatroj, kaj meti ilin en Publikan Asistadon ;*
*2) doni po 500 FF al ĉiu infano, kiu zorgu pri si mem;*
*3) iri en amasloĝejon en Nanterre, en la ĉirkaŭurbo, kie la virinoj kaj la infanoj estus apartigotaj;*
*4) en tri tagoj esti loĝataj en urĝa amasloĝejo;*
*5) esti loĝataj je 150 km de Parizo.*

*Oni povas sin demandi, ĉu tiuj faktoj estas kredeblaj, kvankam realaj. Legi ilin estas kortuŝe ; aŭdi la voĉojn de la elpelitoj estas neelteneble.*

*

*Dum la sama radio-dissendo, okazinta de la 22a kaj duono ĝis noktomezo, tre "oportuna" horo por trafi grandan aŭskultantaron, ĉu ne?! (kvankam la plimulto el la homoj ŝajnas indiferentaj pri tiaj faktoj, iuj emociiĝus...) :*

*Jen la faktoj : Nun en Parizo diversaĝaj homoj (37, 39, 45, 52-jaraj) tranoktas ĉe la Metroo-enirejoj, ĉar ili ne havas laboron ; kelkaj el ili ĝis ili povas sian dormĉambron pagi, kio estas bonŝanco. "Sav-Armeo", "Emmaüs-movado" disdonas manĝojn. Pluraj ĉiutage manĝas nur supon kaj panon. Ilia plej grava maltrankvilo estas eviti la policistojn kaj la "Bluajn", t.e. homojn vestitajn per bluaj kombineoj, kaj kiuj iras tra la urbo por kapti tiujn, kiuj ne havas loĝejon, celante "senpedikigi" ilin, eĉ tiujn, kiuj ne tion bezonas. Oni ne distingas la subpontajn loĝantojn disde la senlaboruloj, kiuj, ofte, pli zorgas pri siaj vestoj. Tiam oni veturigas ilin al Nanterre, kie oni plenumas la senpedikigadon; oni metas iliajn vestojn en purigilon : la taŭgaj vestoj eliĝas ĉifitaj. Kelkfoje oni kaptas ilin, ne konsiderante, ke ili estas tuj manĝontaj. En Nanterre oni proponas al ili malpurajn litojn, ekzemple, kapkusenon sangmakulitan.*

*Kelkaj kazoj : trideksep-, trideknaŭjaruloj rondiris en Francio por trovi laboron. Ili kredis, ke en Parizo ĝi estas pli facile trovebla. Ili provas ne drinki por forgesigi sian malfeliĉan situacion.*

*Al kvindekdujara viro tio estas ankoraŭ pli malfacila. Kaj alia samaĝa viro, krom la aĝa malhelpo, havas plian malhelpon : oni ĵetis lin en malliberejon, ĉar li strebis malebligi al junulo fariĝi toksiĝemulo. Kompreneble, lia enkarcerigo ne favoras por dungiĝo.*

*Kvardekkvinjara virino, kies dekokjara filino ĵus sin ĵetis tra la fenestron, pro la aĉa homsocio : ŝi alterne kuraĝiĝas, malkuraĝiĝas ; frumatene je la tria, serĉas "nutraĵojn" en la forĵetujoj. Ŝi diris : "Mi mortos en la strata defluilo, kiel ofte okazas al multaj el ni" (parenteze, ŝi havas 7 gefilojn). De longe ŝia edzo estas for.*

*Tiuj homoj estas kompareblaj kun la Indianoj. Al tiuj oni donis sterilan grundon, dank'al kiu ili tamen sukcesis pluvivi.*

*Pluraj el ili konscias, ke oni ŝanĝu la homsocion : "Iuj havas bonajn vivrimedojn, iuj estas malsatantoj". Ne temas por ili pri politika vidpunkto. La realaĵoj, kiujn ili travivas, nature havigas al ili tiun konkludon. Preterpasanta virino, elegante vestita, diris al la reportero : "Tia cirkonstancaro estas nekomprenebla. La ŝtato prenas al ni monon por la malfeliĉuloj..." Fakte, en riĉa lando tio estas neimagebla... ĝi estas abomenindaĵo!! Oni ne fieras esti el la homraso; oni hontas eĉ esti franco...*

*Anstataŭ ol krei aerbuson kaj aliajn luksajn veturrimedojn, kiujn la plimulto el la laboristaro neniam uzos, kvankam ĝian monon oni uzis; anstataŭ la raketoj, nukleaj aŭ*

*ne, la armeoj, la diversaj partoprenoj en militoj (Ĉadio, Libano, eble en Centra Ameriko, kiel ĵus sugestis Reagan), teatrejo kaj aliaj luksaĵoj, la neutilaj sed multekostaj vojaĝoj de la regantoj ĉie en la mondo....pli trafe, kaj humane estus zorgi pri la bonaj vivkondiĉoj de ĉiuj civitanoj!*
*Sed, tiel enlande kiel en la mondo, nur la balotadoj interesas ĉiujn regantojn. Tio tedegas la regatojn, des pli ke multajn monatojn antaŭ kaj post la balotadoj oni parolas pri ili.*

*Suzanne.*

1/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/21/2

## *Pri la akceliĝo de la Historio*

*Malfaldinte gazeton mi malkovras, ke dum la pasinta nokto okazis "la ŝtelo de la jarcento". Ĉar mi jam plurfoje legis similajn informojn raportatajn per la samaj vortoj, mi demandas min, ĉu mi estas tiel senpripensa, ke mi stulte preteratentis la forpason de pluraj jarcentoj. Se reportero aplombe asertas, ke la lasta parolado de iu ministra Moŝto estas ja "epokfaranta", tion mi certe ne volas pridubi sed, ĉar preskaŭ ĉiutage ekfloras "epokfaranta" filozofio, kanzono aŭ jogurtrecepto, mi suspektas, ke la respondaj epokoj daŭras verŝajne ne pli ol po unu tagon.*
*Sed kial miri? Tio estas ja konata fenomeno tiel nomata akceliĝo de la Historio. Prigapas ĝin nur stultuloj, kiuj ankoraŭ ne sin svingis en la modernan karuselon. La plimultaj kapturne jam rondiras, ĉiam pli rapide, rapide, rapide...*
*La homo dum jarmiloj vojis piede, rajde aŭ velŝipe. Kompatindulo, kiu ĝistede ĝuis la pejzaĝon kaj tiel perdis amason da horoj, semajnoj, eĉ monatoj, poeziante sub mistera ĉielo plena je dioj kaj genioj. Nun lia pranepo sin pafas per aŭtoj, jetoj, kosmoŝipoj, ĉiam pli foren, pli foren, pli foren... kaj tiel malkovras, ke la ĉielo estas dezerta.*
*Dum jarmiloj la novaĵojn homo interŝanĝis de unu valflanko al la alia per laŭtaj krioj, aŭ heroldis tra la urbstratoj aŭ sur pergamenoj kaj forsendis rajde ĝis diablo scias kie! Tiel disfamiĝis la aventuroj de Odiseo, la morto de Budao, la naskiĝo de Kristo. Nun lia pranepo disponas mirindajn teleilojn per kiuj, en palpebruma daŭro, li povas ekscii pri la gajnanta numero en la nacia loterio aŭ pri la brusta mezuro de la lasta belreĝino. Progreso ne haltigeblas.*
*Iam la murdistoj murdis kaj poste kaŝis sin en atendo de la dia puno aŭ pilgrimis pentofare al Jerusalemo. Eksmodaj moroj! Nuntempaj murdistoj senpacience distrumpetas sian krimon per ĉiuj disponeblaj amasinformiloj kaj laŭte "depostulas" ĝin.*
*Ĉio ja plirapidiĝas. Mozart, la konata mirinfano, estis jam sesjara, kiam li komponis sian unuan simfonion. Li aspektus hodiaŭ iel mensdebila kompare kun niaj genibeboj pianoludantaj sur la klavaro de komputerterminalo por programi la kurtenfaligan akton de nia surtera epopeo.*
*La universala akceliĝo tuŝas eĉ kampojn, sur kiujn unuavide ĝi ŝajnus nepre senefika, nome ekzemple la generan. Mi estis konvinkita ĝis hieraŭ, ke homida frukto postulas naŭmonatan maturiĝon antaŭ ol eliri en la freŝan aeron de nia mirinda terglobo. Nu, mia ĉarma najbarino Sonja, novedzino de nur tri monatoj, hieraŭ naskis belan bebon. Jen lasta sed ne malpli decida pruvo de la akceliĝo de la Historio.*

*Paŭlo A. Roger*

* Noto de la red. : Tiun artikolon la legantaro bonvolu loki en la taŭgan rubrikon, nome la sciencan. Dankon!

## *Kiel kiu vidas tion...*

*Unu leporo kun unu erinaco dialogis pri sento de teknika evoluo kaj progreso ĝenerale :*
*"Vi scias ja tion ĉi ĝuste tiel bone kiel mi", diris la leporo al sia kamarado, "ekzemple ĉi tiun aŭtovojon. La homoj konstruas ĝin, por ke la leporoj kaj erinacoj havu ejon, kie ili povus plivarmiĝi, kiam matene la aero tro malvarmiĝis. Kaj ankaŭ por ke ni povu printempe leki salon, ĝin ili vintre ofte surŝutadas. Laŭ mia opinio la homoj konstruadas la ŝoseojn sur la malplej konvenaj ejoj - tio estas vero! Sed certege ili komprenos ĉi tion post ia tempo kaj pluaj spertoj!"*

*"Ke restadas tro multe da niaj sub la vehikloradoj? Ankaŭ ĉi tio dum la tempo reboniĝos! Nenio estiĝas totale perfekta! Jam nun ni povas rimarki, ke oni malpermesis veturi tro rapide ĝuste pro ni. Tuj, kiam la homoj ankoraŭ iomete pliperfektigos sekuran epikumon - eblos uzadi teknikan progreson al tuta kontento de ĉiuj erinacoj kaj leporoj!"*

*Kaj kun grandega intereso ili ambaŭ sekvis kelke da pezaj konstruadaj maŝinoj, amasigantaj altan remparon tie, kie ankoraŭ antaŭ nelonge bele verdiĝis granda trifolia kampo.*

*-avo-*

**************************************************

***Por niaj infanoj :***

## PRI INDIANA LEGENDO...

- Ĉu vi scias kiu estis la plej granda kaj la plej dika besto longegan tempon antaŭe, dum la prahistorio?
- ...
- Ne, ne estis la diplodoko aŭ mamuto. Estis la kuniklo, jes, jes.

Ĝi estis la plej granda besto el ĉiuj arbaraj loĝantoj. Kaj ĉiumatene la aliaj bestoj venis ĝin gratuli, ĉar ĝi estis tre afabla kvankam ĝi ege fieris pri sia grandeco. Precipe ĝi ege ŝatis rigardi siajn longajn piedojn, kiuj lasas tiel belajn paŝojn sur la grundo. "Vidu, rigardu miajn belajn spurojn, ili estas la plej grandaj", ĝi ĉiam ripetis.
Sed iam, rapide fluganta birdo alvenis kaj diris : "Karega Sinjoro, afero tute nekredebla okazis, oni trovis paŝojn ege pli grandajn ol viaj propraj!". Tuj la kuniklo ellitiĝis el sia komforta pelta lito kaj ekkuras por mem vidi tiun strangaĵon. Kaj kion ĝi vidas, tio sidigas ĝin : grandaj, enormaj paŝoj kuŝas sur la tero, tiel grandaj, ke ĝi eĉ povas sidiĝi en ununura piedspuro. Kompreneble tio estas bedaŭrinda : ĉu ĝi ne plu estas la plej granda? Ĝi revenas hejmen sed pro tio ĝi ne povas manĝi la tutan tagon kaj ne sukcesas dormi dum la tuta nokto. Matene oni trovas novajn spurojn. Por klarigi tiun enigmon, ĝi decidas sekvi tiujn strangajn paŝojn.
Post longa marŝado ĝi subite renkontas fortan lumon. Estas la suno, kiu, ekvidante nian kuniklon, ekklarigas: "Mi decidis momente promeni teren, ĉar ŝajnis al mi, ke estas bela planedo... sed nun mi havas piedon kaptitan de kaptilo kaj mi ne plu povas supreniri. Helpu min", ĝi petas al la kuniklo.
Fakte la kuniklo ŝatus ĝin helpi, ni diris ke ĝi estas afabla persono, kaj ĝi pensas en si mem, ke se la suno iros for, ĝi denove estos la plej granda... Sed estas tiel varmege, kiam ĝi provas proksimiĝi, ke ĝi tuj retroiras. "Kuraĝiĝu vi, la kaptilo doloras



mian piedon" ripetas la suno. La kuniklo iom post iom proksimiĝas. Finfine ĝi sukcesas liberigi la sunon, kiu tuj reiras sur la ĉielon.
De tiam neniam plu la Suno teren revenis.
Sed tiel proksime al la suno venis la kuniklo, ke pro la varmego ĝi malpliiĝis, kaj fariĝis la malgranda afabla besteto, kiun ĉiu konas.
Tamen, se vi ne kredas min, memoru : la antaŭaj kruroj de la kuniklo estas pli mallongaj, ĉar ili pli proksimiĝis al la suno.

**************************************************

El nia arkivaro :

## FRUKTOLOGIO
### de R. Richter

1° ARBARO - Dum vojaĝo en Orienta Prusio, apud la rusa limo, mi renkontis grandajn arbarojn, naturajn gigantajn monumentojn, sub la formo de plurjarcentaj specoj : kverkoj, tilioj, abioj, maronarboj... Tie, la arboj staras ĉe la arboj. Vere, ili ne estas fruktoarboj, tamen vegetaloj, kiuj bezonas multan nutraĵon, kaj portas florojn kaj fruktojn. Sub ilia branĉaro disvolviĝas la arbustoj, inter kiuj la avelujoj. Sub tiuj lastaj oni renkontas en pentrinda malordo mirindajn arbar-fruktojn: fragojn, frambojn, vakciniojn, mirtelojn, kaj inter ili - fungojn, manĝeblajn aŭ ne. Ni aldonu la senliman multformecon de floroj, de herbotapiŝoj, de muskoj, kaj aliaj multegaj vegetalaj estaĵoj, kiujn ne kapablas vidi nia okulo.
Tiam, ni povas nur miri pri tioma vegetanta potenco, plena je vivo kaj suko de tiuj arbaraj plantoj, kiuj aperis el la sino de la Naturo-patrino, kaj en la ĉeesto de tiuj ĉi luksegaĵoj ni demandas : **Kiu do ĉi tie fosas la teron, ĝin returnas, formas ; kiu do rastas, tranĉas, akvumas kaj medikamentas ?**
La tempo fatale venos, kiam ĉiu frukta arbo, greftita aŭ elseme kreskinta, estos kapabla zorgi pri si mem, kaj samtempe havigi al ni fruktojn abundajn, sanajn kaj bongustajn.
Hodiaŭ, grandaj ter-spacoj estas okupitaj de la plantoj, destinitaj produkti al homoj la venenon : tabakon, opion... Anstataŭ tio, la nova kulturo kreos por ni estontece naturajn frukt-arbarojn, kiuj havigos al miloj da familioj certan kaj sanan ekzistadon.

II° PRINCIPOJ DE "STRING FELLOW" - Mi asertas, ke :

1. La arbo, kies radiko estis mallonge tranĉita, naskas plurajn radikojn potencajn, kiuj penetras profunde en la teron, kaj kies longo povas atingi 3 metrojn dum unu sola jaro. Kontraŭe, la arbo ricevita per semo, havas nur unu aks-radikon, malpli viglan.
2. La preparado kaj fosado de la tero ne respondas al la natur-procedoj,

kaj devas esti forĵetitaj. La naturo uzas la teron firman, ne returnitan per la homa mano. La fortaj pluvoj transformas la fositan teron en veran marĉon, kaj tio por sufiĉe longa tempo, eĉ se la drenado estas bone farata. El tio rezultas, ke la junaj radikoj estas dronigitaj kaj tralavataj somere, kaj frostas vintre. Precipe en nordaj landoj sentiĝas tiuj neoportunaĵoj.

3. Kelkjarojn post la plantado la arbo-radikoj proksimiĝas al la ter-surfaco. Ĉe ĉiuj arboj la bona frukto-disvolvo, en volumeno kaj kvanto, dependas de tiuj surfacaj radikoj. Do, oni ne devas fosadi la teron sub la arboj, nek tie planti legomojn, kio detruas tiujn radikojn.

4. La plejbona prizorgado kaj traktado de la fruktoĝardenoj, starigitaj per la mallonga radik-tranĉado, konsistas en la herbo-falĉado plurfoje en jaro kaj dum la kresk-periodo ; lasi la falĉitan herbon surloke, kaj ĉiujare sterki por abundigi la fruktiĝadon.

5. Estas kontraŭ la naturo kaj prudento la tranĉado de arboj en aŭtuno, vintro kaj printempa komenco, maltrankviligas la arbo-ripozon kaj povas kaŭzi trofruan suk-fluon.

6. La plej ofta kaŭzo de la morto de frukt-ĝardenoj estas la kutimo profunde fosi la teron, antaŭ ol planti, ĉu per plugado de la tuta tereno, ĉu per fosado de grandaj truoj por arboj. La perfekta disvolvo de fruktoj, ĉe la matura arbo, dependas precipe de la surfacaj radikoj.

III° KONKLUDO - Ĉiuj miaj streĉoj celas antaŭ ĉio fari la frukto-kulturon laŭeble simpla, natura kaj populara, kaj elvoki en la popolo amon kaj entuziasmon, ĉiam pli grandan por tia kultivado kaj por la naturo. Ili celas ankaŭ, per tiu ĉi artikolo, kontribui por la bono de miaj homaj fratoj. Se mia celo estus atingita, ĝi estus por mi intima kontentiĝo kaj bela rezulto.

De nun, efektive, ĉiu povas planti arbojn kaj kultivi fruktojn, sen apartaj specialaj konoj, sen malfacilaĵoj, sen troaj elspezoj de tempo kaj mono, ĉar la multekosta praktiko de fosado, tranĉado, medikamenta pulvorigado malaperas. Pro tiu motivo mi ne povas kuraĝigi la kultiv-adon en specialaj formoj (ekz. spaliroj), kiuj ne estas naturaj. La plej sanaj arboj pereas iom post iom sub la torturoj de sekciilo, kaj neniam donan esperitan rezultaton. Alie estas kiam oni volas kovri liberan muron, kaj tie alligi spaliron neregulan, sen tranĉado, sed fiksante la branĉojn per ligiloj (vinberarboj, persikoj...).

(....) La opozicio inter Naturo kaj Kulturo estas nur ŝajna. Ĝi estas sukceso por la kulturo, kiam ĝi sukcesas helpi la naturon en ĝiaj procezoj, tiel ke ĝi povu disvolvi siajn kaŝitajn fortojn. Je tia vidpunkto estas produktoj naturaj tiuj delikataj fruktospecoj, kiujn atingis la kulturo. Mia intenco estas agi en fruktologio laŭ maniero plej favora al la natura kreskado kaj plej utila al nia civilizacio. La rezultatoj, kiujn mi atingis, parolas pli elokvente favore al la nova fruktologio, ol ĉiuj doktrinaj opinioj. (daŭrigo p. 25)





# VORTOJ DE MALJUNULO

valo

## Logiko, koro, matematiko

*Mi ĵus relegis la bonegan verkon de Edmond Privat "Esprimo de sentoj en Esperanto". Tiun libreton mi dezirus vidi sur la bretaro de ĉiu esperantisto, en facile atingebla loko apud la zamenhofa Proverbaro, "Ne tiel, sed tiel ĉi" de Faulhaber, kaj "Kiel diri?" de Lentaigne.*

*Ĝi klarigas, kaj ilustras per trafaj ekzemploj, ke Esperanto, pli logika ol la naciaj lingvoj, tamen estas ne tute logika. Feliĉe! Ĉar lingvo pure logika ne estus vivanta lingvo.*

*Mi pensas pri tre kutima uzo, en Esperanto kiel en aliaj lingvoj, de la vorto "koro". Zamenhof ekkriis admone : "Ho mia kor', ne batu maltrankvile!". Nia poeto Selo Grenkamp tre poezie elvokis "kriojn de l'koro". Lanti en letero skribis : "Iafoje mia koro krevas..." Oni povus multigi la citaĵojn pri tiu maltrankvile batanta, krianta, krevanta, suferanta koro. Ni ĉiuj parolas pri la koro, kvazaŭ ĝi estus la sidejo de sentoj. Tamen ni scias, de post almenaŭ du jarcentoj, ke tiu organo estas nenio alia ol kava muskolo, kiu regas la cirkuladon de la sango en nia koro. En pura logiko ni devus rezervi la vorton al tiu sola fiziologia signifo. Sed ni daŭre konservas ĝian tradician sencon, kaj tio tute ne ĝenas nin, ĉar, kiel rimarkigis E. Privat, ni homoj ne estas logikaj.*

*Ie en la libro la aŭtoro komparas lingvon, kiu estus pure logika, al matematiko kaj ĝia sekeco. Tamen eĉ en matematiko estas troveblaj iaj elementoj de belo. En iuj abstraktaj formuloj kuŝas konkretaj karak-teroj de homogeneco, simetrio, harmonio, kaj en la rigoro de iuj demonstradoj aŭ solvoj de problemoj*

*oni prave laŭdas "elegantecon".*
*Multaj homoj, kiuj amas artojn kaj literaturon, senĝene konfesas sian neklerecon en tiu fako. Ili proklamas, kun pinto de fiereco en la tono : "Mi neniam ion kompre-nis pri matematiko". Tamen ekzistas intima rilato inter matematiko kaj muziko, tiu plej bela sentesprimilo; kaj poeto kiel Paul Valéry fervore studadis altnivelajn matematikojn.*
*Ankaŭ Esperanto per sia strukturo posedas tian kvaliton, kiu naskas en la spirito estetikan ĝuon. Zamenhof prave skribis : "Esperanto estas plena je harmonio kaj estetiko". Sed per sia fleksebleco ĝi elsaviĝas el troa rigideco. En ĝia fundamento ja regas logiko, kaj tamen per ĝi la sentoj libere esprimiĝas. Ĝi ne estas simila al malvarma marmora skultaĵo, sed al moviĝema vivanto.*

## Riskoj

*Mi spektis per televido eksterordinarajn aventurojn. Ŝnurdancisto, tiel trankvila kiel sur firma grundo, en Parizo inter ambaŭ turoj de Nia-Damo-katedralo, aŭ en Nov-Jorko inter la du ĝemelaj turoj plej altaj en la mondo; junulo algrimpanta sen ia helpmaterialo vertikalajn klifojn en la Verdon-krutvalo; plonĝisto enprofundiĝanta ĝis 105 metroj en maro sen ia spirhelpa aparato; diversaj akrobatoj, savistoj de dronantoj en maro, kc. Mi rememoris, ke iam ankaŭ mi, je mia tre modesta nivelo, troviĝis en danĝera pozicio.*
*En 1934 aŭ 35, promenante sola tra la dolomitaj klifoj de Meĵan-"kaŭso" (kalka ebenmonto) apud Florako, mi entreprenis algrimpi 30 metrojn altan rokegon. Atinginte la mezon, mi devis halti. En tia okazo sperta alpisto daŭrigus ĝis la supro, sed mi ne kapablis. Mi povis nek supren- nek malsupreniri. Ĉu sin lasi fali kaj frakasi sur la malmolegan rokgrundon, kaj ruliĝi kun rompitaj ostoj laŭlonge de 300-metra kruta deklivo? Kion fari? Unue sobre ekzameni la situacion. Ĝi estis vere kriza. Supre, malsupre, dekstre kaj maldekstre, neniu ebleco. Malantaŭ mia dorso, je preskaŭ 2-metra distanco, staris alia rokego. Ĉe ĝia flanko, iom malpli alte, mi ekvidis mallarĝan horizontalan ebenon, de kiu malsupreniro estus relative facila. Nur unu saveblo: je ajna kosto atingi tiun platformon. La salto estis riska, danĝera, sed mi ne rajtis heziti. Streĉante mian tutan forton mi saltis. Miaj ŝuplandoj frapis la rokebenon, mi premis mian tutan korpon al la vertikala muro, alkroĉis la ekstremojn de miaj fingroj al etaj malglat-aĵoj, por ne fali renverse. Savita! Mi tremis en mia tuta korpo, malvarma ŝvito fluis laŭlonge de mia spino, mia koro tumulte batis, mi tiel restis kelkajn minutojn. Poste, trankviliĝinte, malrapide, mi komencis malsupren-iri per la piedoj kaj manoj.*

*Kial mi rakontis tiun okazon, iel esceptan en mia vivo? Ĉu por fanfarone min glori? Certe ne : ĉar mi tute ne estas fiera pri tiu rememoro. En tiu tago ja, en plenkreska aĝo, mi kondutis kiel sencerba bubaĉo. Mi donas tiun ekzemplon al junuloj, ne por ke ili min imitu, Dio gardu! sed por ke, imite al tiuj unikaj herooj, kiujn mi admiris, ili sciu, ke por venke alfronti grandegajn riskojn, necesas :*
*1-e, akiri majstrecon per longa spertado;*
*2-e, konstante sin trejnadi;*
*3-e, fiksante al si celon, precize mezuri la koncernajn danĝerojn, kaj serioze sin prepari por ilin superi, en plena posedo de siaj korpaj kaj mensaj kapabloj kaj de sia kulturita tekniko.*
*La supermajstroj en tiaj aferoj tute ne estas spontanaj, malsingardemaj diletantoj, sed veraj fakuloj, sendube naturdotitaj, sed perfektiĝintaj per longa pacienco - eĉ tiuj, kiuj estas ankoraŭ junaj. Ne ĉiu ajn posedas la necesajn kvalitojn por atingi ilian nivelon. Ĉiu konsciu pri siaj propraj kapabloj, kaj provu nur tion, kion li povas sukcesi.*

***Valo.***

**************************************************

**FRUKTOLOGIO** (fino de p.22)

(...) Mi ne pulvorigas, ĉar tio ne necesas. Mi ne fosas la teron per instrumentoj, sed mi ĝin tenas malpeza per la ĉiama tavolo de humo. Mi ne tranĉas, ĉar miaj arboj scias mem kiel ili devas kreski, por atingi sian celon kaj iĝi pli belaj.
Mi estus ankaŭ fosanta la teron kaj faranta specialajn truojn, se tia penado kaj elspezado estus poste repagitaj per pli granda valoro de la arbo. Sed ne estas tiel, kaj mi plantas en tereno nefosita ; tiel mia arbo fariĝas, kiel tion pruvis la sperto, multe pli rezistema, pli vigla, pli produktanta, kaj la radik-tranĉo sekvigas la novajn radikojn, kiuj profunde penetras en la malmolan grundon.
Do, la tero argileca kaj plej firma estas eksterordinare favora por la nova metodo, - ĝi estas la plej bona, la plej dezirinda...
(Fonto : "La Vivo Universala", n° 23, de aŭgusto 1935. Iel, praekologiano, ĉu ne ?)

*Nia novelo :*

**Hagen Hirte**

# LA ĈEFO HAVAS LA NOMON KRAK

Noktiĝas. Mi staras kun damo sur la perono, kaj la damo indignas pro iuj neniaĵoj. Ni atendas la "ĉifonul-kolektantan", la lastan trajnon por nia linio, tial la kromnomo. Tute ĝustatempe tiu alvenas kaj same ekzaktatempe ekveturas. Ĝi kunprenas ĉiun, kiu ajn uzas la bonŝancon. Okazas tiel, ĉar la trajno justas kaj bonanimas.

Eniris la trajnon ebriuloj, studentoj, fervojistoj, gesinjoroj ĉiuspecaj. Eniris kompreneble ankaŭ ni : la tre deca damo kaj mi. Post iom da tempo kelkaj veturantoj komencas dormeti. Se ili ne estas dormontaj, tiukaze ili silente elrigardas la nigron malantaŭ la fenestroj. Aliaj babiladas, intersiblas, kisas, kriaĉas... Ni ekzemple konversacias, pridiskutas la tagparton jam pasintan. Baldaŭ venos la biletkontrolisto.

- Bonan vesperon, gesinjoroj! La biletojn, mi petas!

Rutine la kontrolisto senvalidigas. Li havas perpleksigan metodon por tio : li duoble truigas ilin.

- Kaj vi ? Viajn biletojn... mi tre petas!

Kion vi nun pensas? Ĉu ni posedas, ĉu ni ne...? Ni posedas! Mi estas ja kun deca damo survoje, kaj tia damo ĉiam posedas. La mian neniam endas serĉi! Unue eleganta manmovo kaj due :

- Bonvolu, sinjoro!
- Dankon, sinjorino!

Klakas kvarfoje, kaj niaj biletoj estas plejbone kontrolitaj.

- Bonan vojaĝon, sinjorino!
- Agrablan deĵoron, sinjoro biletkontrolisto!

Min li ne atentas. Kial cetere? Por tio li aŭguras malagrablon. Fatalaĵo, fatalaĵo! Ĝuste la tagon, en kiu ni partoprenas la servojn de la nokta trajno, ĝi ekhaltas por ni du staciojn tro frue pro iaj rellaboroj.

Ni devas eltrajniri, promenas iomtempe ĝis la stacidoma halo, eniras kaj sidiĝas atendonte. Kiam mi provas refunkciigi la konversacion, subite la halo estas inundata de gejunula grego. Sekve oni ie rok-en-rolis. Eble ie estis dancarango. Erinackapoj aperadas, ĵinzvestaj ĉifonoj enokulsaltas, kaj ekprovokas striitaj ĉemizoj. Kiel ŝafaro la long- kaj kurthararuloj kuniĝas en angulo de la halo. Verŝajne devas esti tiel. Kiel alie la bandestro povus prezenti sin ? Kaj videble li prepariĝas. Unue li blekas iom, kaj tuj poste ankaŭ la aliaj blekas. Poste li kantas ian anglan vortkunmeton, kaj jen ili same... Tiam la ĉefo kuradas kiel bonstila longdistanca kuranto cirkle la halon, evidente serĉante oferon. Ha, la virino en la giĉeto! Li envicigas sin antaŭe. Devas ja esti, ke la ĉefo ĉiam antaŭstaras la vicon. Tion la enviculoj ne trovas maljusta. Senproteste ili silentas.

- Bela ino - diras la ĉefo al la sulkvizaĝa virino en giĉeto. Veturbileton mi petas. Nu, kaj eksprestempe, se tian eblas peti. Aparta trajno, se vi komprenas pri kio temas. Ne gapu do. Entute unu bileton, ne du, ne tri. Vi ja certe komprenas, ĉu? - li tion diras malice kun flankenrigardo al la grego - Kaj eĉ ege subite, se mi rajtas peti, kanajlo.

La virino ne miras, tute ne. Ŝi laŭte diras :

- Foriĝu, bubo, por ke mi ne voku la policon!
- Kiun ? La policon, ĉu? - La ĉefo dum sekundo senkomprene enengapas la giĉeton. Poste li ekkriĉas: Hoho, vidu nur, la kanajlo! Jes, ek al la polico! Jen mia legitimaĵo, bonvolu kontroli. - Triumfe li ĵetas la dokumenton antaŭ la virinon.
- Do, voku la policon, jes ja, ege rapide. Ili enkarcerigu min. Ne hezitu, belulino. Mi tute ne havas tempon.

La virino rigardas sur la legitimaĵon, retroiras el la giĉeto kaj post momento envenas la halon. Sen ia videbla ekscito ŝi enmanigas la dokumenton al la mokema ĉefo.

- Sidiĝu ie, kondutu kiel decas ĉi tie, aĉulo, lasu la stultaĵojn.

La grego blasfemas : Kio do, Krak, kiu ĉi tie estas la ĉefo? Ĉu vi timas inaĉojn?

Iu aŭdacas ridi. Sed tion la ĉefo ne ŝatas. Fulme li atakas la ridinton, draste batas lin, tro draste kaj tro kolere. La bando enmiksiĝas : Krak, ĉesu! He, ĉesu do.

Sed Krak ne atentas pri io ajn. Li trenas la pekinton sur la kvadrataj platoj. La bando postsekvas. Kaj la knabinoj el tiu grumblas. Kaj ankaŭ la tre deca damo grumblas : Ververe, kia aĉulo! Estas ja tute ne kredeble. Diru, ĉu io tia vere eblas?

- Jes - mi respondas - vi ja vidas. Mi diras tiel,

ke bone aŭdeblas. La rimarko ne tre plaĉas al Krak. Li fikse rigardas min. Jen estas nur sola eblo. Sentime rerigardi la ĉefon. Nu do, efikas, la ĉefo retiriĝas!

Li nun rondvagas por fiksi alian oferon. Transflanke de la halo sidas profesoro, eblas, ke li estas oficisto. Ĉu li hazarde eĉ...? He, idiotaĵo. La sinjoro legas la ĉiutagan gazeton. Ĉu male estis sportgazeto? Mi ne scias. Nepre legas li. Kaj kiu noktomeze en stacidomo legas gazeton, tiu por Krak estas suspekta persono Li pro tio per fingro tuŝas la gazeton. Videble la viro ne rimarkas tion. Li legas plu sen suprenrigardi. Ĉu li kredas la halon gazetlega sekcio de la Library of London? Mi ne scias, sed eblas. Krak atakas nun pli energie. Li provas ŝire eĉ trian fojon. Nenia rezisto! La ĉefo kontentas.

Denove li cirklas, poste paŝas en la halmezon, sternas sin sur la platoj kaj deklaras emfaze : Enkarcerigu min, enkarcerigu min finfine, porkoj!

Por substreki la efikon de tio dirita, Krak komencas plori. Estas tute originalaj filmlarmoj, falantaj el la okuloj de la ĉefo, kaj tamen io mankas ankoraŭ, kio ne akordiĝas kun la sceno. Krak ekhavas ideon. Li elprenas la personan dokumenton, ĵetas ĝin foren kaj diras : Damnita legitimaĵo, mi ne bezonas legitimaĵon. Infero kaj diablo! Enkarcerigu min!

Li klinas sin super la dokumento kaj ŝajnigas la elŝiron de paĝoj. Sed nun la grego ektimas : Krak, haltu. Aŭskultu momenton. Ĉu vi estas freneza?

Ili alproksimiĝas, ĵetiĝas sur lin kaj provas forŝiri la dokumenton de li, kio sukcesas iel. Krak rekuŝigas sin sur la platoj kaj denove larmas.

- Ĉu io tia vere eblas? - La deca damo apud mi plian fojon demandas.
- Jes ja, kial vi ne kredas? - mi tute mekanike diras.

Subite la atendita trajno aŭdeblas. Ĝi anoncas sin per kriĉa fajfo, kaj jen ankaŭ kriĉfajfas la bando. La ĝisnunaj statistoj en la Krak-teatraĵo enfone perdiĝas. Krak havas novan taskon. Li estas nun la pleje plej kriĉa fajfo de la trajno. Kaj li estas nun la denova kuranto, la rapida, la eleganta. Li kuras kaj fajfas. Lia ŝalo bunte flirtas.

- He, hoho, pffffff, pfffffffff, pfffffffff !

Ekstaze salutante li svingas la pugnon. La grego kriaĉas ekscitite. Ege rapide ĝi kuras.

Post Li.

***



## Recenzo : "La racia kaj ateista budhismo"

Esperantistaj budhanoj festas. Dum lastaj kelkaj monatoj diversaj eldonistoj aperigis tri gravajn eldonaĵojn pri budhismo esperante, nome, vicigitajn laŭ ilia aperigotempo : "La instruoj de Budho" /Bukkyo Dendo Kyokai, Japanio/, "La nova evangelio de la oriento" /Kyoto Internacia Meditada Kultura Esplora Instituto, Japanio/ kaj nun "**La racia kaj ateista budhismo**" /SAT-Broŝurservo, Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut, Francio/, kiu eble ne la plej dika estas, eĉ tutcerte ne la plej belega SED sendube inter tri gravaj eldonaĵoj tiu havas la plej kuraĝan verkiston kaj tradukiston, ĉar tiu ĉi libreto provas doni al legantoj la plej koncizan kaj kompletan sciencnivelan prezenton de la Budho-Instruoj. La provo sukcesas eĉ per brila esperanta teksto.

Ĉiuj tradukistoj, kiuj provis jam transplanti budhistan faktekstojn, scias bone, ke verki nur mezbonan tradukaĵon estas tre malfacila - preskaŭ heroa tasko - pro manko de interkonsentita terminaro. La tradukisto (bedaŭrinde sennoma) trovis sekvindan solvon de tiu ĉi problemo, aplikinte originalajn terminojn, fine verkinte sanskritan glosaron, kiu estas unika valora helpilo en evoluo de budhista-esperanto- fakterminaro. Eblas, ke la tradukisto (el franca teksto) aplikis multfoje ne la plej simplajn lingvajn solvojn (ĉu tio ĉi estas puninda delikto?), kaj la tradukaĵo mem ne celas komencantojn, sed tiu fakto estas certa, ke sen konado de tiu ĉi nepre legENDa libro estas nesolvebla tasko verki novajn vere altnivelajn tradukaĵojn en temokadro de budhismo.

Enkondukvortoj de Hermann Schröder heligas - kvankam nur kiel rimarketo - diversecon de la budhistaj vidpunktoj. La libro mem ampleksas tre precizan, sciencnivelan, koncizan konigon de Budho-Instruoj, sub ĉapitrotitolo "Strukturo de la Darmo". En kadro de tiu ĉi titolo la verkisto donas mallongan konigon pri "la kvar noblaj veraĵoj", "vojo al transcendeco, vekiĝo", "elementoj" (tiu temas pri "la okera Vojo", "la ĉeno de interdependaj originoj", "la tri karakteroj de la fenomenoj", "la kvin eroj konsistigantaj la homan individuecon", "la impulsoj", "la budhisma amo", "la dek jugoj").

En ĉapitroj "Pri Racieco", "Determinismo kaj libero",

"Konklude...", la verkisto rakontas pri sia starpunkto, kiu memkompreneble trovos atakantojn kaj defendantojn inter legontoj. Laŭ mia opinio, pri tiu ĉi libro longe diskutos budhanoj kaj ĉiuj legantoj, nome ke la verkisto traktas pri la plej sentema punkto de la budhismo. Ĉu ĝi estas ateista aŭ ne? Ĉu...?
Nu mi ne provas konigi mian opinion en tiu ĉi mallonga recenzokadro. **Faru ĝin la legantoj.**

Győző Bedegi.

*****************************************************

Kelkaj prezentaj vortoj pri

## "Jaro 2000" de Henri MULLER

De pli ol 30 jaroj Henri Muller publikigas artikolojn en diversaj medioj.

"**Jaro 2000**", verkita laŭ la formulo de la romano de E. Bellamy "Looking Backward", lokas nin en socion ege plibonigitan, sen malŝparoj, sen malmoraleco, pli justan, pli humanan, fine kapablan, dank'al ekonomia kadro tute renovigita, plene profiti de la plej bonaj fruktoj de l' progreso teknika kaj scienca : malpli da tedaj laboroj, pli riĉaj libertempadoj, plena garantio de la enspezo, kia ajn estas la daŭro de la laborperiodo; fine, post tre malmulte da tempo, tre sentebla plialtiĝo de ĉiuj aĉetpovoj.
La aŭtoro de "Jaro 2000" konstruas sian ellaboraĵon ekde la nuna epoko, kaj, se li montras kiel la novaj ekonomiaj institucioj sekvas senprobleme la nunajn, li ne forgesas - tio estas la plej atentinda parto de la verko - precize priskribi, neniel cedante al la facileco, kelkajn el la vojoj ireblaj por atingi la tagon T.
Starigante la fundamenton de nova ekonomio perfekte adaptita al la postuloj de niaj teknikaj civilizacioj, tiu libro devus alporti al ĉiu perspektivojn de vivo rapide liberigita el la bezono, la maltrankvilo, la timo, kaj, al la humanistoj, la kadron de ege fekunda aktiveco.

* "Jaro 2000", ĉe SAT-Broŝurservo. Mendkodo : JA, prezo : 30 FF + afranko (20% da rabato por abonantoj de "Laŭte!"). Apartenas al la broŝura serio eldonita de SAT-Broŝurservo por 1984 kun :
- "La racia kaj ateista budhismo" (vd. ĉi-supre) 4 FF
- "Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo"(Leo Polak) 3FF
- "Konstrui fajron" (J. London) 4 FF
- "Ĉu ni vere helpas la trian mondon?" (Glyn Roberts) (10 FF) kaj, por franclingvanoj : "Tiel diru!" 20 FF



# laŭtaj informoj kaj petoj

### Apud Barcelono...

En Vilanova i la Geltru, bela kaj mara vilaĝeto apud Barcelono (Hispanio), okazos la 1-a Internacia Esperantista Semajno. Ĝi okazos de la 1a ĝis la 8a tago de Julio. Oni gvidos kursojn, oni instruos pri "sardana" kataluna popoldanco, ktp.
Jen la adreso :
Seccio d' Esperanto del Centre d' Estudis
Biblioteca-Museu Balager, Sant Gervasi, 45
VILANOVA i LA GELTRU (Garraf), BARCELONO, HISPANIO.

### *Pilgrimado en Akvitanio...*

De la 11a ĝis la 18a de aŭgusto 1984

Sur la spuroj de la pilgrimantoj al Santiago de Compostella...
El MOISSAC (Tarn-Garonio, Francio) ĝis MONTREAL DU GERS laŭ G.R. n° 65 (unu el la franca sistemo de longaj transiraj vojetoj). Sur la belaj okcitanaj vojetoj en amika etoso ni marŝados kaj samtempe ni vizitos multnombrajn mezepokajn monumentojn.
Rapide anoncu vian partoprenon, ĉar nur la 10 unuaj personoj estos elektitaj pro materiaj kialoj :
- Ni tranoktos en etaploĝejoj kaj ni kooperative aĉetos kaj pretigos la manĝaĵojn. Vespere eblos manĝi en malmultekostaj restoracioj.
- Pro tio, la maksimuma kosto estos 100 FF tage.
- La partoprenontoj nepre kapablu marŝadi kun dorsosako 18-20 km-ojn ĉiutage.
Deirpunkto : Stacidomo de MOISSAC (Tarn-Garonio), fervoja linio Bordeaux-Vintimille.
Pliaj informojn kaj aliĝilojn vi petu de : Ginette Gabillon, 32 rue Renault, F 33200 BORDEAUX CAUDERAN, Francio.


### Studtago pri la problemo de la instruado de Esperanto en Aix-en-Provence, sabaton 26an de majo *

Ĝi okazos en : Centro d' Aix de la Universitato de Provenco, 29, avenuo Robert-Schuman, en salono 410 (4a etaĝo, sektoro de I.L.G.E.O.S). Komenco je la 9a matene.
Kvar temoj : instrumetodoj, lernolibroj, gramatiko, statuso de l'instruantaro) kun jenaj kontribuoj :

* L! n-ro 53 erare anoncis pri la 26a de marto. Senhezite pugfrapu!

Arlette DUC GONINAZ : Sperto pri la instruado de E en mezlernejo(CES)
Jean MAGNAN : Grammaire de l'E et grammaire française dans l'enseignement aux adultes.
André GENTE : Pri la uzo de la malnova, sed valora <u>Junul-Kurso.</u>
Sylvaine BOURRELLY : La méthode active (sur la base de la méthode Sekelj) dans l'enseignement aux débutants.
Michel DUC GONINAZ : Précisions sur l'enseignement de l'E à l' Université de Provence.
Structure de la phrase simple et notions grammaticales de base (notamment l'accusatif).
Daniel MOIRAND : L' Espéranto et le problème de l' examen.
Renée TRIOLLE : Instruado de Esperanto : enkonduko al internacia komunumo.
Vizito al la E-biblioteko de ILGEOS. Libroservo de la E-Federacio Vaŭkluza.
*******************************************************************

## KRUCVORTOJ de Th. Falissard



(difino kun eliziita vorto indikas solvovorton mem eliziitan)

**Horizontale** : 1. Reĝimo. 2.Ŝiparo; frakci'. 3. Ilprovizo ; karton-foliet' aŭ paperfolieg'. 4.En emajlo, aŭ en marmoro, aŭ eĉ en diamanto ; renverse rebriligi. 5. Moviĝema malsanul'. 6. Forpreni ; li vivas en boto... 7. Estinta ; hereda faktor' (renverse). 8. En eliksiro ; indiki takton. 9. Frandaĵ' el sukeritaj migdaloj.

**Vertikale** : 1. Tendenc' por lumradio reeliri el medio. 2. Forkura; en kapo, en brako, eĉ en la kalkanoj! 3. Tabul' por distrado, ne por lernado ; senkapigita arb' (ĝi perdis sian unuan literon). 4.Insekt-ara. 5. Elfrotu renverse. 6. Bromo ; umbelacaro. 7. Saltanta insekt'; idonaska estaĵ'. 8. Asbest'. 9. Renkontej' por la sango kaj la sentoj; koranoteolog'. 10. Metafizika ismo.
*******************************************************************

la venonta numero aperos komence de julio
*******************************************************************

Gérant-imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut. CPPAP 58651